



Unua: Mortotuko kaj rivero Nilo

MORTOTUKO

La Mortituko konservata en Torino estas lina tuko dimensie cm 436x110 (437x111), spinita kaj permane teksita kun multaj neregulaĵoj. La fiŝdorsa desegno liveras ĝian aspekton noblan kaj preciozan; la escepta morbido estas merito de la lino utiligita kaj al la fajneco de la tekstilaj fibroj. Ekzameno pri la teksa konstituo ne permesas malkovri la aĝon. En la proksima-orienta areo estis trovitaj multaj simiulaĵoj al la mortotuka teksaĵo, interplekte, teksmaniere kaj kelke da neregulaĵoj, dateblaj je la tempoj de Kristo.

En tiu historia epoko, Egiptoj uzis spini kun maldekstruma tordado, dum la proksimaj popoloj spinis dekstrumen tordante.

En efektigitaj ĝinunaj esploroj oni rajtas hipotezi ke la mortotuka teksaĵo originas el Sirio. Kromaj interesaj datenoj: *Komponaĵo*: pura lino, pezo gr/mq: 225. *Armatur*o: serĝo: kun rezulto "fiŝdorsa" aranĝita per 40 fadenoj movitaj dekstrume kaj 40 maldesktrume, ĉiu laŭ mm 11 ĉirkaŭ. *Varpo*: n. 36 fadenoj ĉiucentimetre; *titolo* Nm 40000 (40000 metroj pezas 1000 gramojn). *Vefto kaj Varpo*: tordiĝantaj al maldestren.

LINO

Liano estas la plej antikva kaj ŝatata vegetala fibro, eltirita "basto" de herba planto de la familio de Linaceoj. La fibro ege rezistas kaj havas altan termikan konduktivon kaj tial ĉe takto allasas karakterizan freŝan sensacon. Orginite de Azio, lino kreskas en ĉiuj landoj gcuantaj je modera kaj humida klimato en aluvia tereno. La plej antikvaj trovitaĵoj reirigas al 8.000 aK., sed la transformiĝo de la fibro al lino reirigas nur al 4.000 aK., kiel dokumentite en la temploj kaj sur la muroj de la egiptaj tomboj. La veloj estis linaj ĉar fortikaj kaj rezistaj kontraŭ impetaj ventoj.

La plej antkva lina teksaĵo konservita estas fragmento trovita en neolitika grenejo de 5.000 jaroj antaŭ Kristo (*Kulturo Fayum A*).

La egiptaj tomboj de Beni-Hasan de la Meza Regno (2130-1575) kaj de Tebo (Nova Regno - 1575-1087) bonege ilustras la prilaboradon de lino, kiel oni povas vidi en la pentraĵo de Ben-Hasan ĉi-sube bildigita.- La tombo de la arĥitekto *Ka* kaj de lia edzino *Merit*, en Deir el Medina, konservas grandajn tukojn: tiu de *Ka* havas mezurojn de m. 4,15x1,20 kaj tiuj de *Merit* 4x4 kaj 2x2. Tordo maldekstruma (S).

(suba foto) Arkeologiaj restaĵoj de fiŝdorsa lina teksaĵo: nekropolo de Antipolo de la dua jarcento pK, en al-Tar in Iraq, 80 km. el Babilono: 8 lanaj kaj linaj specimenoj



Dua: Tombo

Ni estas en Jerusalemo la 7an de aprilo de la jaro 30a, aŭ la 3an de aprilo de la 33a pK. Ni certas ke temas pri la datoj dokumenteblaj pro la apartega informo ke la morto de Kristo koincidis kun la hebrea Pasko laŭ la sacerdota kalendaro kiu en tiu jaro koincidis kun la Sabato, motivo pro kiu Johano ĝin nomas "Granda Sabato". Por tiuj koincidoj eblas nur la jaro 30a aŭ 33a.

"La Judoj, cxar estis la Preparado (Paeaskevo), por ke la korpoj ne restadu sur la krucoj dum la sabato (cxar la tago de tiu sabato estis granda tago), petis Pilaton, ke oni rompu iliajn krurojn, kaj forportu ilin.". (Jo 19,31)

"42 Kaj kiam jam vesperigxis, pro tio, ke estas la Preparado, tio estas, la tago antaux sabato, 43 venis Jozef el Arimateo, honorinda konsilanto, kiu mem atendadis la regnon de Dio; kaj li kuragxe eniris al Pilato, kaj petis la korpon de Jesuo. 44 Kaj Pilato miris, cxu li jam mortis; kaj alvokinte la centestron, li demandis lin, cxu li de longe estas mortinta. 45 Kaj sciigxinte de la centestro, li donis al Jozef la korpon. 46 Kaj li acxetis tolajxon, kaj deprenis lin kaj envolvis lin en la tolajxo, kaj metis lin en tombon, kiu estis elhakita el sxtonego; kaj li alrulis sxtonon al la enirejo de la tombo" (Mk 15,42-46).

La nova tombo troviĝis je malmultaj paŝoj de la loko de la ekzekuto, eble iom pli ol 50 m. fore, kiel oni povas vidi en la interno de la baziliko "Sankta Tombo". Tiutipaj tomboj, fositaj en roko facile laborebla, troviĝas najbare de la Sankta Tombo kaj en Jerusalemo: (Fotoj: la tomboj diritaj de la Herodoj kaj tiuj tiel diritaj de la reĝoj). La nuna Sankta Tombo certe respektas la lokon de la entombigo de Kristo sed ne la formon ĉar ĝi estis plurfoje detruita spite al la kristanoj.





Tria: Entombigo

En tiu pentraĵo de Mario Caffaro Rore al ni komprenigas la entombigon de Jesuo laŭ la sinoptika evangeĝiopokj. Tamen: involvita, ja jes, en la tuko vertikalamaniere kaj ne horizontalmaniere, sed komplete nuda kaj kun la maldekstra kruro (kaj ne la dekstra) restanta altigita pro la kadavra rigideco. La tomboniĉo eble estis antaŭata de atrio aŭ vestiblo kaj la tomboĉambro eble oni povis demeti 9 kadavrojn, ĝuste kiel atestite en la tomboj tieldiritaj de la Reĝoj kaj Herodoj.

"38 Post tio, Jozef el Arimateo, kiu estis disciplo de Jesuo, sed sekrete pro timo antaux la Judoj, petis Pilaton, ke li povu forpreni la korpon de Jesuo; kaj Pilato permesis. Li do venis kaj forprenis lian korpon. 39 Venis ankaux Nikodemo (tiu, kiu unue venis al Jesuo nokte), portanta miksajxon de mirho kaj aloo, cxirkaux cent funtoj. 40 Ili do prenis la korpon de Jesuo, kaj cxirkauxvindis gxin per tolajxoj kaj aromajxoj, laux la kutimo de la Judoj por entombigo. 41 Kaj estis gxardeno en la loko, kie li estis krucumita, kaj en la gxardeno nova tombo, en kiu ankoraux neniu estis metita. 42 Tien do, pro la Preparado de la Judoj (cxar la tombo estis proksima) ili enmetis Jesuon (Jo 19,38-42)".



Lokalizo de la tombo

"En 312 Konstanteno konvertiĝas al kristanismo kaj en 313 permesas al la kristanaro kredoliberecon, Makario, episkopo de *Aelia Kapitolina* (Jerusalemo) konvinkigas Konstatenon kaj lian patrinon Helenan rekuperi la lokon de la pasiono kaj morto kaj entombigo de Jesuo, jam profanitajn per paganaj surkonstruaĵoj. Kun la permeso de la imperiestro, Helena, malgraŭ siaj okdek jaroj, en 326 ekvojaĝis. Ŝi plenumas traesploradon kune kun la episkopo *Makario* kaj, laŭ buŝa tradicio, ŝi sukcesas identigi la Golgoton kaj la Tombon.

Helena revenas Bizancon, konigas la esplorajn rezultojn al Konstanteno, kiu decidis terenĵeti la paganajn surstrukturĝojn kaj starigi grandiozan porkultan establilon. En 328 Konstanteno kaj, pro ties ŝarĝo, Makario terenĵetigas la konstruaĵojn, liberas kaj evidentigas Golgoton kaj Kalvarion kaj starigas monumentan establilon. *Eŭsebio el Cezareo* (265-340) nin detale informas pri la karakterizoj de la konstruejo kaj la pri adoptitaj problemsolvoj. La imperiestro ordonas elimini la konstruaĵojn de Adriano kaj fosi la materialojn iam ĵetitajn sur la Tombon kiu, certamomente, allumiĝas. Oni ne haltas ĉi-punkte; sed enukleis la rokan kubon kiu ĝin entenas, kreante specan niĉon laŭ la tipo de la tombo de Zeĥaria.

Tiu ĉi konstituiĝas el bloko de viva ŝtono, izolita el la malantaŭa parieto, per la detruo de la ĉirkaŭa roko, kaj ornamita per pilieroj kaj entajlaj dekoracioj. Detale, la roko, entenanta la tomban kavon, estas eltondita al

formo de retangula prismo, aŭ pliprobable oktangula. Eŭsebio precizigas ke temas pri antro, ĵuse fosita en la maso, kiu troviĝas sola en la vasta loko.

Kiel ni vidas, ĉi tio estas konfermita de la rakontoj de la unuaj pilgrimoj priskribantaj la lokon. Oni, do, registras ke la enirejo estas tre modesta tiom ke enirantoj devas kliniĝi, ke la tombo-ĉambro povas ricevi nur naŭ kunajn homojn kaj ke la porkadavra benko longas iom pli ol du metroj kaj larĝa iom malpli unu.

Dokumentoj

skribaj: Golgoto kaj Kalvario estas cititaj ĉe diversaj skribaĵoj antaŭ kaj post la jaro mila. Laŭ *la Anonimo de Bordeaux*, kiu en 333 skribas tekston atingintan nian epokon kiel "Itinerarium Burdigalense", temas pri kriptoj. *Cirilo episkopo de Jerusalemo* (315-386) asertas ke la tombo havis vestiblon, fortranĉitan dum la laboroj ordinita de Konstanteno. Ĉe la fino de 4a jarcento alvenis al Jerusalemo *Eteria*, hispana religiulino, pliprecize Galicia. Ŝi priskribas la *Anastasis*, la bazilikon de la Martiro, kaj Kavarion konfirmante la donitaĵon de Eŭsebio. Ankaŭ *Sankta Hieronimo* konas la Tombon, Anastasis kaj Kalvarion.

Plue ni havas priskribojn pri la Sanktaj Lokoj tradiciitajn de *Eŭkerio*, episkopo de Liono en 440, de anonima aŭtoro de la *Breviero* kaj de ĉefdiankono Teodozio, ambaŭ en 530. Ankaŭ laŭ Antonino, pilgrimulo de Piaĉenco atinginta la Sanktan Urbon ĉirkaŭ la jaro 570a, la tombo estas fosita en natura roko, viva. Pri tio parolas ankaŭ la patriarĥo Sofronio en poemo de 638. En 670 estas skizita la unua desegno de la lokoj permane de Arkulfo, episkopo de Gaŭloj, kiu loĝis en Jerusalemo laŭ naŭ monatoj.

Sortoj de la Tombo

La 20an de majo 614 Persoj, gviditaj de Korsoe la 2a, venkis la bizancan armeon, konkeris Jerusalemon: kaŭzas egajn detruojn, ruinigas la Anastasis kaj Bazilikon de la Martiro mortigante la gardistojn, entute 375 homojn; enprizonigas multajn, inter kiuj la patriarĥon Zeĥarja, kaj kunportas en sian patruojn, kiel trofeon, ankaŭ la lignon de la Kruco.

Pro malĉeesto de la patriarĥo, abato Modesto, efektivigas la necesajn restaŭraĵojn. La inaŭguro de la novaj refaritaĵoj okazos 14 jarojn poste, en 628, kiam la urbo estis konkerita de Eraklio, la lasta bizanca imperiestro kiu kapablis kontroli la Palestinon. Eraklio revenigas Jerusalemon la krucon, rehavigitan de la Persoj.

En 638 okazis la araba konkero. Jerusalemo estas okupita de la islamaj armeoj gviditaj de konkerinto Oman. La kalifo alvenis el Orienta flanko de la urbo, nome el la paro de la olivarba monto, konstatas ke la Templo esplanado estas en malaŭdinda stato de forlaso, sub amaso de forĵetaĵoj, kaj ordonas ke ĝi estu purigita, kio okazas kun la faktiva kunlaboro de Judoj. Sur ĝi estas establita islama preĝdomo. En 1009 al-Hakim, kalifo de Egiptio, ordonas la detruon de ĉiuj sinagogoj kaj preĝejoj de sia reglando. La Sanktaj Lokoj estas disrabitaj la 25an de aŭgusto. La trupoj furioze atakas la Bazilikon de la Tombo, cele de malaperigi la tombon mem. La Anastasis kaj la niĉo estas disfalgitaj. De la baziliko saviĝas la malsupraj strukturoj, nome la pavimo, la tomba benko kaj la bazo de flankaj parietoj, ĉar submergitaj de ruinaĵoj. Dum, do, la detruoj de la Persoj de 614 kaj Araboj de 638 ne damaĝis la rokon de la Tombo, tiu ĉi kalifo ĝuste tion celis kaj sukcesis.



Kvara: Akeopita bildo de Edesa

En Edesa (nune Urfa, sudeste de Turkio, (en la direkto al Libano kaj Sirio) en 544, eble dum la restaŭrado de la muregoj necesigitaj de la sieĝo de la persa Korsoe la 1a, malkovriĝis niĉo kun tuko enhavanta neksplikeblan bildon dirita ĝuste "akeropita" (acheiropietos = nefarita de koma mano). Oni ĝin grekesirie epitetis "mandiljo" (= eta tuko, eta mantelo). Ĉe tiu bildo venadis skrupule inspiriĝi ikoniistoj al kiuj tamen estis montrata nur la vizaĝo kiel eblas vidi en miniaturoj kaj antikvaj freskoj.



El la alto al malalto: 1) 11a jarcento, Aleksandrio (Patriarĥa Greka Librejo); 2) 12a jarcento (Novgorod, Spas Nededitisa); 3) 12 jarcento (Gradac, Serbia). (Ne estas ĉi tie vidigita la fresko, de la 10a jarcento, de la preĝejo de Sankta Johano en Sacli en Kapadokio, iam konserviĝis en la preĝejo "Hagia Sofia" (Sankta Sofio, absolute senbilda) kies restaĵo videblas en la foto.

Permisitaj pentristoj estis akurate selektitaj.

Ekde la jarcento 6a, fakte, ikonografio signas signifan vojturnon. La Kristaj Vizaĝoj (antaŭe libere realigitaj) similas inter si ĉiam pli: tio pensigas, ke ili dependas de unika stampo, nome la sankta Vizaĝo de Edesa. Sed kial ĝi estis tramure kaŝita kaj poste forgesita laŭ jarcentoj? Tradicio asertas, ke urba episkopo mem ĝin kaŝigus kaŭze de tuja persekuto kontraŭ la kristanaro kaj ties sanktaĵoj. La sekreto poste perdis siajn malmultajn atestantojn.

Ankoraŭ restas neklarite kiel el Jerusalemo la mortotuko translokiĝis al Edesa: ni havas nun legendojn kiuj tamen dokumentas la realecon de la fakto sed ankaŭ helpas ĝin ekspliki per "piaj motivoj".



Kvina: Mandiljo en Konstantinopolo

La historio de Mandiljo kiu atingas Jeruslemon la 15an de aŭgusto 944 estas klare dokumentita, eĉ celebrita ankaŭ hodiaŭ ĉiujare la 16an de aŭgusto en Konstantinopolo, tago dum kiu ĝi estis definitive lokigita en la preĝejo de Blacherne (vidu en la foto). Eĉ okazis kontraŭ la urbo (Edesa) milito kaj sieĝo gvidita de Kurkas generalo de la bizanca imperiestro Lekapeno (920-944), do kontraŭ la islamanoj jam posedantoj de la urbo. Bonŝance militistoj trovis akordon: estis liberigitaj la prizonuloj kaj elpoŝitaj 12 mil arĝentaj kronoj. Belega miniaturo vidigas *Gregorion la Refenderion*, ĉefdiakono kaj referendario de Sankta Sofio, eksperta membro de la imperia delegacio taskita ricevi la Akeropitan Tukon. La reprezentita tuko montras bildon de Kristo kaj estas ege longa. Gregorio estis la unua “esploristo” de la Mortotuko, kaj la unua ilustristo de la plej malfacila bildo de la historio. Li prezentas en homelio la Mandiljon aŭ la vizaĝon de Edesa al la imperiestro Lekapeno, al la patriarĥo Teofilato, al la imperia kortego kaj al la sennombra popolo. La manuskripto kuŝas en la vatikana biblioteko



Gregorio tiel priskribas la Mandiljon kiun li epitetas “sindono” imitante, evidente, la Evangeliojn kiuj ĝuste greke parolas pri "sindono", nome mortotuko. El la homelio de la 16a de aŭgusto el la pupitro de Sankta Sofia: "... bildo stampita nure per la agonijaj ŝvitoj de la vizaĝo de la Princo de l' Vivo, kiuj trafluis kiel sangaj riveretoj, kaj de la dia fingro. Estis ili (la ŝvitoj) la ornamoj kiuj kolorigis la veran stampon de Kristo.

“Kaj la bildo, post la ĉeso de Liaj fluoj, estis plivalorigita de la gutoj de Lia flanka riparo. La du elementoj estas plenaj je informoj: tie ĉi sango kaj akvo, tie ŝvito kaj bildo. Kiu ekvilibro de la elementoj! Ĉar ili (devenas) el unusola kaj unika (fonto). Oni vidas ankaŭ la fonton de vivakvo kiu sensoifigas instruante ke la ŝvitoj kaŭzis la bildon... Iom post iom oni kutimiĝas al io kio neniam vidiĝis kaj kion okulo kaj menso neniam spertis.

“*Bildo dekonturita* ĉe bordoj, kiu malintensiĝas ĝis malaperiĝo, kiu, se vi alproksimiĝas, paliĝas kaj malaperiĝas dum se vi malalproksimiĝas ĝi malmergiĝas; *koloro* senvigora, kiun vi ne scias kiel difini, kiu preskaŭ translimiĝas el la gamo de koloroj; *du longaj figuroj* de senvesta korpo, fronta

kaj dorsa, tiel strange kaj senlogike apudigitaj; *amaso de signoj* evidente sangellasaj, stampitaj eĉ ili sur la haŭto de absoluta kadavra senmoveco... antaŭ ol enabismigi en tiun longan senvortigan kontempon kiu ĉiam estas, por ĉiu, la unua kontakto kun la Mortotuko. Por ĉiuj, la unua kontakto kun la Mortotuko estas longa observado en longa silento”.


Kiu ajn vidis la torinan Mortotukon sentas ke tiuj vortoj ne povas ol dependi de la rekta vido de tiu tolaĵo. Kaj ni estas apenaŭ en 944a jaro. *Robert de Clari*, kavaliro de 4a Krucmilito, origine el Pikardio, skribas en sia historio pri la konkero de Konstantinopolo (temas pri unu el la unuaj patroj de la “*langue d'oïl*” kiel franca nacia lingvo): la urbo estis prirabita dufoje: la 17an de julio 1203 kaj la 12an de aprilo 1204. Inter la du rabadoj Robert de Klari povas kontempli la Mortotukon (“Sindono”):

“... establas alia monaĥejo nomita Sankta Maria de la Blacherne, kie la Mortotuko, en kiu estis envolvita Nia Sinjoro, kaj kiu ĉiuvendrede estas levita tutrekte tiel ke oni povis klare vidi en ĝi la bildon...”, kaj konkludas: “... **Neniu, nek grekulo nek latinulo scias tion kio okazis al la Mortotuko post la rabado de la urbo**”, nome tiu de la 12a de aprilo 1204.

"Et entre ches autres en eut un autre des moustiers que on apeloit medame Saint Marie de Blakerne, ou li sydoines la ou nostres sires fu envelopes, i estoit, qui cascuns des venres se drechoit tous drois, si que on i pooit bien veir le figure de nostre seigneur, ne ne seut on onques ne Griu ne Francois que chis sydoines devint, quant le vile fu prise".

En Konstantinopolo, do, oni ne kontemplis nur la vizaĝon kiel iam en Edesa, sed la tutan (kaj ne nur) la frontan figuron kiel atestas ankaŭ diversaj miniaturoj, el kiuj la plej nomata estas tiu de la *Codex Pray* (1192) de Budapeŝto (en la supra foto).

Multe konatas ankaŭ tiu de Saloniko. La tolaĵo, duige faldita, estis, vertikale etendita, montrata al la popolo. La dorsa parto restis tiele kaŝita, eble por ne kontraŭi la pudoron de la korpeco de Kristo. Notendas en la pentraĵo kiel estas la dekstra mano kiu sin surmetas sur la maldekstra kaj kiel la mano havas nur kvar fingrojn: datenoj tiaj certe ligitaj al la antaŭa observo de la aktuala Mortotuko, kies ni nun fotajn posedas negativon kaj pozitivan..



Mortotuko de Saloniko



Sesa: La idolo de la Templanoj

Kiu ŝtelis la Mortotukon dum la disrabado kaj kiu ĝin sekrete gardis laŭlonge de 150 jaroj malobeante la reskripton de papo Inocento la 3a kiu ordonis ke estu redonita ĉiujn ŝtelitaĵojn por ne kaptiĝi en la ekskomunikon? Eble ni neniam scios la nomon de la raba ŝtelisto, sed kiu ĝin gardis estas fine konita de historiisto, almenaŭ laŭ supozoj, ege fonditaj, de *Ian Wilson* de la universitato de Oxfordo: la **Templanoj!** Jen liaj pruvoj:

“Ĉiu scias kiom ili estis ĉasantoj de relikvoj kaj kiom ili estis lertaj en la gardado de sekretoj el kiuj la plej granda estis tiu koncernanta la Mortotukon, por kiu ili estis stiparumitaj en Parizo en marto de 1914. **Jacques de Mollay**, Grandmajstro de la Ordeno kaj **Geoffrey/Geoffroy/Goffredo de Charny**, Grandmajstro de Normandio (suba foto) estis akuzitaj pri idolatrio: ili adorintus la kapon de homo barbohava (de pagana idolo, oni diris). Ian Wilson konsultis la aktojn de la proceso kaj en sia libro reskribas la gravajn atestaĵojn kontraŭ la templanoj. Neniu, tamen, tiun kapon trovis. La sekreto estus bruligita kune kun la Templanoj se dum restaŭraj laboroj (sekve de bombadoj de 1944), en eksa templana domo en Templecombe en Sussex, oni ne trovus la kapon de tiu barbohava homo (vidu foton) pentritan sur panelo kiu kovris lukfermilon al la subtegmento. Ĝi ŝajnas estinti keŝkovrilo”.

Komputilo rivelas ke 125 punktoj koincidas kun la vizaĝo de la mortotuka homo. La idola de la Templanoj estis la Mortotuko-Mandiljo de Edesa-Konstantinopolo. “Idolo” multe pli honorinda ol tiu de la proceso.







Sepa: Peripetioj de la Mortotuko

Okazas en Lirey (Champagne), 100 km el Parizo, en 1353, ke la mandiljo-mortotuko malmergiĝas al la lumo post 159 jaroj de kaŝiĝo en la domoj de la Templanoj: ŝatata, gardita kaj kultata kun solenaj noktaj procesioj (Vidu procesajn aktojn).

Estas la portaflagisto de la reĝo, *Geoffroy de Charny el Lirey*, la nova posedanto de la Mortotuko: li konstruigas kanonikan preĝejon, kie do stabile oficu kanonikoj, kaj en tiu preĝejo ekspozicias tiun Mortotukon kiun poste estos nomata "Sindone de Torino". Unuafoje en Europo.





Oka: Medalego memoriga

La arkeologia famaĵo de tiu solena montrado estas la memoriga medalego trovita en la rivero Senna en 1855 najbare de Pont-au-Change: Eksterordinare valora trovaĵo! Ĝi estas konservita en Parizo en la Nacia Muzeo de Mezepoko -Thermes de Cluny. Sen tiu dokumento, fakte, ni neniam sciis kiamaniere oni ekspoziciadis la Mortotukon kaj tio (nun ni scias) efektiviĝis horizontale (kaj ne vertikale kiel en Konstatinopolo) por ke oni povu vidi ne nur la frontan bildon sed ankaŭ tiun dorsan.

La bareliefo de metalo (plombo, stagno) reliefcizelita (cm 4,5x6,2), ekzakte reproduktas, fakte, la Torinan Mortotukon, kaj la nobelajn ŝildojn de Geoffroy de Charny kaj Jeanne de Vergy (lia edzino), meze de kiuj staras la tombo malplena. Temas pri la unua prezentaĵo de la Torina Mortotuko laŭ tuta ĝia realo. La reĝa portaorflamulo tamen mortas en la batalo de Poitiers en 1356 kaj enfosas kun si la sekreton pri la origino de la Mortotuko ĉe siaj posedaĵoj.

La Templanoj, antaŭ ol la fulmatako de Filipo la Belulo de la ektagiĝo de la 13a oktobro 1307 kiam ĉiuj Templanoj estis arestitaj kaj iliaj posedaĵoj sekvestitaj (kun granda indigno de la poeto Dante), certe posedis kaj veneris la tolaĵon sanktan.

La solenaj montradoj rekomenciĝis en 1389 ekscitante fortajn kontestadojn kun ĉefe tiuj de Pierre d'Arcis, episkopo de Troyes, kiel jam faris sia antaŭulo Henri de Poitiers.





Naŭa: Polenoj de Max Frei kaj Sulzer

Ĉu oni povas esti certe pri la rekonstruita itinero de la Mortotuko de Torino? Ke ĝi pasis tra tiu vojiro montras ankaŭ polenologio. Svisa polenologo, *Max Frei* kunlaboranto de la Interpol, ekde 1973 ĝis 1978 identigis 55 specojn de plantoj, post la ekzameno pri la polenoj elprenitaj el la Mortotuko per 12 gluiloj, nome:

7 estas tipaj de Palestino, el kiuj du kreskas nunepoke sur la restaĵoj de la muregoj de Jerusalemo;

16 apartenas al la areo de la Morta Maro, (kaj mankaj en Eŭropo);


16 kreskas en Anatolio (Turkio), el kiuj du en Urfa-Edesa kaj unu en Konstantinopolo. Temas ofte pri entomofilaj polenoj, ne transporteblaj do per la vento (anemofilaj);

16 estas polenoj de mediteraneaj plantoj (Eŭropo kaj Proksima Oriento).

Israelaj botanikistoj *Aharon Horowitz* kaj *Avinoam Danin* konfirmas la malkovraĵojn de Frei pristudinta la elprenaĵojn.

"Almenaŭ duono de la polenoj trovitaj en la Mortotuko devenas el floroj, kaj plue ili estas entomofilaj; ili estas preskaŭ ĉiuj printempaj floroj.... La pristudo de la fotoj de la tolaĵaj surfacoj sub *polarizita lumo* certe ne permesus traviĉi la formon, kiel oni vidas en herbolibro, de ĉiu specioj identigitaj de Frei kaj, eventuale, de alispeciaj plue.

Ĉi-punkte konkludendas ke ĉio pelas al devigita akcepto: sur la Mortotuko ĉeestas granda kvanto da floraj printempaj polenoj".



Deka: La sainte Chapelle (La Sankta Kapelo)

La Mortotuko ne restis lungatempe en *Lirey* ĉar la lasta posteulo de Geoffroy de Charny, Margarita de Charny, ĝin portas kun si en siaj vojaĝoj kaj en 1453 ĝin cedas al *Ludoviko de Savojo* kaj ties edzino *Anna de Lusignano*, enfalante pro tio en ekskomunikon aljuĝitan de la eklezia tribunalo de Besançon kaj en longan serion de procesoj. Ŝi fine mortos ekskomunikita la 7an de oktobro 1459.

La Savojoj akordiĝas kun la kanonikoj de Lirey ilin agnoskante leĝaj proprietuloj de la Mortotuko kaj ĝin elaĉetante per 50 oraj frankoj jare; kaj konstruigas specifan preĝejon (1552) kiu nomiĝos Sankta Kapelo (Sainte Chapelle) same kiel tiu de Parizo de Sankta Luizo la 9a ĉar eĉ ĝi gardas relikvojn.





Dekunua: Memoriga stampo (16a j.)

Papo Julio la 2°, per buleo de 9a maja de 1506, aprobas la brevierajon kaj Meson honore de la mortotuka relikvo-memoraĵo kaj fiksas kiel daton de la liturgia festo por la 4a de majo, dum kiu estos solene montrata la Mortotuko





Dekdua: La incendio

Ĉi tie tamen la nokton de 3-4a de decembro 1532 la Mortotuko suferis incendion: kvar maltimuloj ĝin savas: duka konsilisto Filipo Lambert, forĝisto Vilhelmo Pussod, kaj du francikanoj sin ĵetas trans la flamoj kaj sukcesas akvumi la keston kaj ĝin porti eksteren.





Dektria: La damaĝoj de la incendio

La incendio gravege damaĝis la Mortotukon lasante tamen preskaŭ integra la bildo. Stagna guto kaŭzis simetriaĵn bruligaĵojn, kiel oni povas vidi en la suba foto-rekonstruo





Dekkvara: Ĝustigoj

Klaraninoj de Chambéry estis oficiale kaj solene ŝarĝitaj ripari la Mortotukon, kion ili faros ekde 15a de aprilo kaj la 2a de majo 1534, antaŭvigilo de la jara solenaĵo. Ili kudras la Mortotukon sur tolaĵo (tieldirita) de Olando (Nedrlando), kaj al tio aldonas kvar flikaĵojn por ŝtopi kvar truojn kaŭzitajn de la bruligo.

Pri tio ĉio restas longa kaj interesa protokolo kun, foje najnaj, informoj .

"... Al ni ŝajnis ke la flanka vundo, la plej elokventa (tiu de la koro), dirus senĉese jenajn vortojn: *"O vos omnes qui transitis per viam, attendite et videte si est dolor similis sicut dolor meus"* (Ho vi ĉiuj kiuj trairas vojon, haltu kaj konsideru ĉu estas doloro kiel tiu mia). Ni vidadis, fakte, sur tiu granda bildo suferojn kiujn oni ne povus imagi. En ĝi ni plue vidis figuron de vizaĝo tute lividigita kaj tute martirigita per batoj, la dian kapon trapikitan per grandaj dornoj el kie eliris sangaj rojetoj fluantaj sur la frunto kaj dividiĝantaj laŭ diversaj direktoj ĝin (la vizaĝon) survestantaj per la plej altvalora imagebla purpuro.


"Ni rimarkis, sur la maldekstra frunta flanko, sangan guton pli grandan ol la aliaj kaj pli longan, zigzagantan kiel ondo, Jen la blovoj aperis bone konturitaj, la okuloj malpli, la nazo, la parto plej prominenta de la vizaĝo klare enpremita, la buŝo bele skizita kaj iom eta, la vangoj ŝvelaj kaj misfiguraj rivelis ke ili estis kruele batitaj, aparte la dekstra; la barbo nek tro longa nek tro kurta – laŭ la kutimo de nazireoj – videblas maldensa tie kaj tie ĉar parte ĝi estis promalŝate forŝirita kaj la sango estis algluinta la restaĵon...

"Ankoraŭ ni observis longan signon malsuprenirantan sur kolon kiu nin kredigis ke Li estis ligita per ferĉeno dum la aresto en la Olivarba Ĝardeno ĉar vidiĝis diversaj ŝvelaĵoj kvazaŭ Jesuo estis tiritaj kaj skuitaj; la lividaĵoj de la flagilbatoj tiom oftis sur la brusto ke malfacilis trovi zonon, eĉ etan kiel pinglo, senan de batosignoj; ili kontinue interkruciĝas kaj etendiĝas laŭlonge de la tuta korpo ĝis al la plandoj; sanga grumelo signas la vundojn ĉe la piedoj. Sur la videbla flanko de la dekstra mano, kiu estas bone markita kaj surmetita sur la maldekstra, kies kovras la vundon; la truoj de la najloj estas en la centro de la longaj kaj belaj manoj, el kiuj serpentumas sangaj rojetoj ĝis la ŝultroj; la brakoj iom longaj kaj belaj okupas pozicion tian ke ili permesas vidi la tutan ventron kruele ŝiritan pro la flagilbatoj; la vundo sur la dia flanko aperas sufiĉe larĝa por permesi ke penetru tri fingroj (ĉikaŭita per sanga makulo larĝa kvar fingrojn) kaj mallarĝiĝanta malalten, laŭlonge de duonpiedo.

"Sur la dua duono de la sankta Mortotuko, kiu prezentas la malantaŭan parton de la korpo de nia Savanto, vidiĝas la kapa nuko trapikita per longaj kaj dikaj dornoj kiuj estas tiom oftaj ke la krono devis esti kaskoforma kaj ne cirkloforma same kiel tiuj de la princoj kaj same kiel prezentate en pentraĵoj; se oni atente observas, vidiĝas la nuko pli trapikita ol la cetera korpo kaj la dornaj signoj profunden penetritaj, kun vastaj gutoj de sango koaguliĝinta tra la haroj kiuj estas vaste sango-kovritaj; la sangaj spuroj sub la nuko estas pli vastaj kaj pli videblaj ol tiuj aliaj ĉar la bastonoj per kiuj oni batis sur la krono igis penetrantaj la dornojn ĝis la cerbo, tiom ke spite de mortigaj vundoj, estis miraklo ke Li ne mortis sub la batoj; krome ili certe remalfermiĝis pro la skuoj de la kruco kiam oni tiun metis en la kavon kaj, ankaŭ antaŭe, kiam oni Lin devigis fali sub la krucon por Lin

sur ĝin najli; la ŝultroj estas ĉiuloke certe ŝiritaj kaj surŝutitaj per flagilbatoj. Sangaj gutoj montriĝas larĝaj kiel majranaj folioj; en pluraj lokoj estas vastaj ŝiraĵoj pro la batoj donitaj; meze de la korpo oni rimarkas la postsignojn de la ferĉeno kiu Lin ligis tiom strikte al la kolono ke ĝi aperas tute sange makulita; la diverseco de la batoj indikas ke oni uzis diversajn specojn de fragiloj, vergojn kun interplektitaj dornoj, ferŝnurojn kiuj Lin tiom kruele deŝiris ke, se rigardata el malantaŭo, kiam ĝi estis etendita sur la tolo de Olanda aŭ sur la teksilo, la Mortotuko montris la vundojn kvazaŭ oni rigardus vitron. Ĉiuj fratinoj Lin kontemplas multe atente kun tia konsolo ke oni ne kapablas esprimi; ni vidis per tiuj diaj spuroj kiel Li vere estis la plej bela el filoj de la homoj, konforme de la profetio de Davido kiu tion antaŭvidis en unu el siaj psalmoj...."

Temas pri la unua priskribo, detala kaj preciza, pri la Mortotuko





Dekkvina: La Mortotuko en Torino

En 1578 Savojoj, kiuj akiris Piemonton kaj Ligurion kiel novajn reglandojn, sukcesas translokigi la Mortotukon en la preĝejon Sankta Laŭrenco en Torino, nova ĉefurbo de iliaj dukaj teritorioj. Abato arkitekto Guarino Guarini (Modena 1624 - Milano 1683), postulate, prezentas projekton kiu estos realigita en 1693. Malantaŭ la domo elstariĝas mirinda kupolo de la duka kapelo kiu devos gastigi la Mortotukon ĝis nia epoko.





Deksesa: Interno de la kapelo

Antaŭ ol enfermi la Mortotukon malantaŭ ferstangoj, la pastro beata *Sebastiano Valfré* plenumigas novajn reparaĵojn kaj anstataŭigas grandparton de la protektaj tukoj iam aplikitaj de la klaraninoj (26 junio 1694).



deksepa: Memoriga presaĵo

Inter la presmemoraĵoj de la solenaj jaraj montradoj (4a de majo) kaj eksterordinaraj restis fama tiu de 14-15 de junio 1582 okaze de la dua pilgrimo de Sankta Karolo Borromeo el Milano.



Dekoka: Savo de la Mortotuko

En la nokto de 11-12 de aprilo 1997 en la reĝa palaco eksplodis incendio kiu etendiĝis al Guarini-a Kapelo de la Mortotuko kaj al duoma absido kie, malantaŭ la ĉefaltaro, estas laŭtempe lokita la Mortotuko pro restaŭra kapelaj laboroj cele de la montrado de 1998. Aŭdacaj fajrobrigadistoj sukcesas rompi la romp-imunajn kristalajn murojn kaj porti saven la Mortotukon tute sendanĝeran.

Estas tiu la tria sendetrua incendio suferita de tiu fama tolaĵo laŭlonge de du jarmiloj.



Deknaŭa: La unua fotisto de Mortotuko

Inventisto de la foto estas Niepce Nicéphore kiu en 1822 fokusigis sian inventon: la foto-arto kreskas laŭ du etapoj. Unuamomente la enkanaligita lumfasko impresas la fotoplakon ŝmiritan per arĝentaj saloj, allasante renversitan figuron (= fota negativo) de la luma fonto; duamomente la sama proceduro estas farita en fotografia laboratorio sur papero traktita per arĝentaj saloj kaj rezultas la stampaĵo (= fota pozitivo). La fotaj negativo kaj pozitivo koincidas kun la negativo kaj pozitivo optaj.

Umberto la 1a por celebri la nupton de sia filo Emanuelo kun la Helena de Montenegro kaj la 50an datrevenon de la Albertina Statuto, anoncas solenan montradon de la Mortotuko okazonta elde 25a de majo ĝis la dua de junio. Estas komisiita foti la Mortotukon SECONDO PIA, laŭprofesie advokato sed entuziasme fotisto. Kvankam neprofesia li obtenis brilan foton de la Mortotuko kiu tamen havigis al li malagrablan ŝercon. Estis tute misordigita la koincido inter la negativoj-pozitivoj optaj kaj fotaj: estis la nokto de 28a de majo 1898. En la fota negativo emerĝiĝis opta pozitivo kiel oni povas vidi en la sinsekvaj fakoj.

Li enfokusigis kaj impresigis kvar oficialajn fotoplakojn, kun formato cm 21x27, kun malsamaj tempoj de ekspono al lumo.






Dudeka: Vizaĝo de Kristo


En la rivelbano la granda plakto de Secondo Pia elmontris ĉiam pliklare la trajtojn bone konturitajn de la homo de la Mortotuko, same kiel la homa okulo esperas vidi (opta pozitivo), nome la malo de tio kion esperus vidi la fotisto sur sia fota negativo. Kio okazis por ke la fotaj kategorioj ne estus koincidaj kun tiuj optaj? Unika ebla respondo (laŭscience) estis tiu ĉi: oni fotis optan negativon!

Tiu estis la granda eltrovo kiu onin alportis al la granda intereso por la Mortotuko, krom la fakto, eĉ pli ŝatenda por kredantoj, ke tie riveligis la trajtoj de la homo de la Mortotuko kiuj antaŭe estis kontempleblaj nur renversitaj: temis, fakte, pri vizaĝo bezonanta interpreton pro la neprecizeco de ĝiaj trajtoj.




Dudekunua: Fronta bildo

Fota pozitivo sed opta negativo (maldekstre), fota negativo sed opta pozitivo (dekstre).



Dudekdua: Dorsa bildo

Fota pozitivo sed opta negativo (maldekstre); fota negativo sed opta pozitivo (dekstre)



Dudektria: La granda negativo de Pia

Jen la fama negativo de Pia en sia integreco. Povas ankaŭ ni konstati, fakte, kiel li, ke la tuta sceno enkadrigita (kadro entenanta la Mortotukon, nigra drapo sur kiu ĝi staris etendita, altaro, floroj, kandeligoj, ktp) aperis logike negative, nur la figuro (ne la sangaj spuroj) sur la mortotuka tolaĵo estis reproduktita pozitive. La bildo videbla en la Mortotuko, tial, legendas kiel reflektita de okulo: tio kion oni vidas dekstre de la figuro estas reale la maldekstra, kaj inverse. La klarobskura inversigo ŝuldiĝas al la fotografia procezo. Post pli ol 1850 jaroj estis fine malkaŝita la sekreto de la Mortotuko kiun ikonistoj, miniaturistoj kaj pentristoj provis interpreti. Sed la malkovraĵo estis tro granda kaj tro bela.


“... La impresoj estis tuj enorma en Pia mem, en aŭtoritatuloj kaj en tiuj kiuj informiĝis pri la novaĵo. En ĉiuj formiĝas la intima konvinko pri la absoluta aŭtenteco de la trovaĵo el kiu la fotografia tekniko estis eltirinta la veran kaj unikan bildon de Jesuo Kristo, kiu restis kaŝita laŭ preskaŭ du mil jaroj. Post kelka malsekretaĵo, la sciigo estas publikigita de “L'Osservatore Romano” de 14-15a de junio de 1898 per la titolo ekstreme signifa: *Mirinda fakto*. Dume aperis la junia numero, ĉiam en 1898, de la *Rivista di fotografia* (Revuo de fotografio), bulteno de la lombarda fotoklubo. Ĝi atentigas pri la apartaĵoj kaj teknikaj malfacilaĵoj kaj informas la specialistojn, ke la negativo realigita de Secondo Pia “observita en ĝia luma travidebleco, nome en obskura medio en kiu oni ĝin vidigas (...) ekscitas potencegan impreson”.

Tamen la rezervoj rilate la seriozecon kaj profesiecon de Pia eliros ĝuste el medio de prifotaj specialistoj.

La unua atako, serioze vestita, formuliĝis en Parizo: *Le Moniteur de photographie* de 15a de septembro 1898 lanĉas informon pri la malkovro de Secondo Pia kun rezervoj, tamen, pri la korekteco de la proceduro aludante, eĉ eksplicite akuzante, trompon: per tiu akuzo oni alvenis al la konkludo ke la tuta afero “Mortotuko” mankas je aŭtentaj fundamentoj.

Rapide oni publikigas eksplicitajn akuzojn pri manipulado kiuj ŝajnis orkestritaj de gazetkampanjo vere misfamiga. La atestaĵoj de Secondo Pia kaj ties kunlaborantoj, formaligitaj en notaria akto, estas deklaritaj falsaj per la sentenco de spertuloj, kiuj tamen ne vidis la pozitivan montreblan. Interesas aldoni ke inter la multaj konfirmoj de la valideco de la malkovro de Pia estas ankaŭ du fotoj de aliaj du fotoamatoroj. Temas pri pastro Gianmaria Sanna Solaro kaj de laŭtenanto Felice Fino, polica oficiro komisiita police servi en la Duomo. Iliaj fotoj, spite de limoj de tekniko ankoraŭ multe malperfekta, konfirmas la oficialajn rezultojn.

NB La ideo kaj propono foti la Mortotukon estis elkapiĝinta el salesa don Noguier de Malijay. Ne atingis nin la rezultoj de liaj fotoj faritaj per fotoportilo.



SCIENCA VALORO DE LA MALKOVRO DE SECONDO PIA:

La 21an de aprilo 1902 agnostikulo, **Yves Dealage**, franca akademiano, spertulo pri ĝenerala biologio, biomekaniko, eksperimenta fiziologio kaj zoologio, sciencekipite prelegas pri la Mortotuko de Torino, kun jena titolo: "LA BILDO DE KRISTO VIDEBLA EN LA MORTOTUKO DE TORINO"

"... Se la hipotezo ke la homo de la Mortotuko estas Jesuo Kristo ne havas bonan akcepton ĉe certaj homoj, tio okazas pro tio ke multaj opinias, ke religia afero vualas la rezonadon de la "malkovrintoj". Se ne temis pri Kristo sed pri Sargono, Aĥilo, pri iu el la faraonoj, neniu havus ion por obĵeti. Mi konsideras Kriston kiel historian personulon, kaj ne komprenas kial certaj homoj povas teruriĝi antaŭ tuŝebla spuro de lia ekzisto. Al mi rezultas ke tiu foto estas vera, nenimaniere retuŝita. La bildo kiun la tuko prezentas al la vizitanto direblus "negativo": fakte la reliefaj partoj estas obskuraj, tamen estas klaraj la kavaj. La korpo de tiu homo – ĝis malmulte antaŭe mistera kaj nekompreneble kavigita inverse – posedas ekzaktegan modelformon. Kaj tiu vizaĝo - mi tion ne povas negi – estas vere ŝoka. Oni diras ke temas pri la vizaĝo de Kristo. Mi tion ne scias: sed mi ankaŭ ne scias al kiu ĝi povas aparteni. Kaj se mi ĝin komparas kun portretoj kiujn la plej grandaj pentristoj depost la reneŝanca epoko ĝis niaj tagoj imagis pentrante Jesuon..., nu tiu ĉi ilin ĉiujn superas. Kaj el tio naskiĝis en mi la problemo malkovri kiel eblis formiĝi tiu bildo...". (*Revue Scientiphique, XVII, 1902, 4a serio, 638-87*).

La scienculo riskis sian reputacion. Estis tamen la granda starto al ĉiam pli nombraj sciencaj studoj pri la Mortotuko.



Dudekkvara: Mortotukoj: kopioj de triu de Lirey

De antaŭ Lirey, se resumi, ni posedas la reprodutaĵojn de la vizaĝo nur similtajn al tio kio estis montrate al la ikonistoj pilgrimantaj ĝis Edesa por skrupule kopii la akeropitan bildon (la tuta korpon); kaj poste al Konstantinopolo estis montrata nur la fronta bildo, kiel dokumentite de miniaturoj kaj freskoj, kaj de la mortotuko de Besançon.

Nur post Lirey oni povas paroli pri Mortotukoj (kun, nome, fronta kaj dorsa figuroj):

- La absolute unua reprezentaĵo estas tiu de la medalego memoriga de la muzeo Cluny de Parizo: ĝiaj mezuroj: 4,5x6,2 cm. Elakvumigita el la rivero Senna en 1855: plombo-stano reliefcizilita, datita 1350-56 (Vidu la numeron dekan)
- La mortotuko pentrita de Albrecht Dürer en 1516, konservita en Lier (preĝejo de sankta Gommaire) en Belgio: ĝi estas absolute la unua pentraĵo reproduktanta la integran bildon de la Mortotuko, kvankam reduktitan laŭ triono de la vera longo: surprize rimarkeblas pro la bruligaj truoj (3+1) en kvar simetriaj lokoj. Eble temas pri la spuroj de la fajropruvo volita de Emiro de Edesa en la 7a jarcento.
- La mortotuko de Besançon: mortotuko de nur la fronta parto: unua oficiala montrado, la 5an de aprilo 1523; detruita ordone de la Nacia Konvencio la 23an de marto 1794. Ĝi estis frukto de retrovo (ĉu reala aŭ ŝajnigita?). La fakto ke ĝi prezentas nur la frontan parton igas nin certas ke ĝi devenas el la orientaj landoj. Eble alia ŝtelaĵo de la krucmilitistoj dum la kvara krucmilito de 1204. Probablas ke ĝi venis tramanen de Otto de la Roche, estro de Ateno, kiu ĝin sendus al sia patro en Francio, kiu siavice ĝin donus al la episkopo de Besançon, Amedeo di Tramelay: poste perdita aŭ kaŝita, ĝis kiam ĝi reaperis por la montrado de 1523. (En la foto reproduktaĵo de la mortotuko de Besançon fotita de Baima Bollone).
- En Inzago (Milano) konserviĝas kopio de mortotuko (de antaŭ la incendio) de la ven. Maria Franciska de Savojo donita de Emanuelo Filiberto al Sankta Karlo Borromeo: cm 436x110. Ĝi estis tranĉe dividita laŭ du partoj iniciate de nepreparita parokestro kaj poste, saĝe, laŭvole de la episkopo, per kudre remetita al la origina formo.
- La mortotukoj postincendiaj de 1532 estas 52: aŭ kun dato skribita (27) aŭ facile dateblaj (25) kaj estis ĉiuj evidente kopioj de tiu de Torino: sufiĉas vidi la bruligaĵojn kiuj ne estas realaj sed nur pentritaj

Konkludo: NE EKZISTA MORTOTUKO MEZEPOKA.



